

Schopenhauer kaj la Upaniŝadoj

Ekde kelke da tempo mi scias, ke la germana filozofo Arthur Schopenhauer (1788-1860) ricevis influojn de orientaj ideoj, sed nur nun, kiam mi preparis prelegon pri la Upaniŝadoj, mi legis detalojn pri tio.

Bedaŭrinde troviĝas en la E-Vikipedio nur jena frazo pri la Upaniŝadoj: *“La Upaniŝadoj estas bramanismaj sanktaj libroj de klasika hinduismo.”*

Ankaŭ mi ne volas ĉi tie paroli detale pri ili. Mi donu nur kelkajn bazajn informojn:

La Upaniŝadoj estas pli ol cent tekstoj verkitaj kelkajn jarcentojn (inter 600 kaj 200) a.K.. Ili estas la kvara kaj lasta parto de la Vedioj (la plej sanktaj verkoj de Hinduismo, estiĝintaj ekde 1500 aŭ 2000 a.K.). De la kvar partoj, la Upaniŝadoj estas la plej filozofia.

Kiel la tuta antikva hinda literaturo, ili estis verkitaj en sanskrito. La unua traduko al alia lingvo – la persa – okazis en la 16-a jarcento, kaj nur en 1802 la Upaniŝadoj iĝis konataj en Okcidento, kiam franco tradukis persan tradukon de 50 Upaniŝadoj al la latina.

Tiun latinan tradukon legis Arthur Schopenhauer en 1814. La latina teksto, kiu do ne estis traduko el la originalo, sed el ne tre bona persa traduko, ne estis facile komprenebla. T tamen oni diras, ke Schopenhauer – per iu sagaca percepto – komprenis la esencon de la filozofia enhavo.

En la anglalingva Vikipedio legeblas i.a.:

La germana filozofo Arthur Schopenhauer legis la latinan tradukon kaj laŭdis la Upaniŝadojn en sia ĉefa verko, “La Mondo kiel Volo kaj Ideo” (1819), same kiel en la verko “Parerga kaj Paralipomena” (1851). Li trovis sian propran filozofion konforma al la Upaniŝadoj, kiuj instruis, ke la individuo estas manifestiĝo de la ununura bazo de la realo. Por Schopenhauer, tiu reala subkuŝanta unueco estas tio, kion ni scias en ni mem kiel "volo". Schopenhauer kutimis teni ĉe sia flanko kopion de la latina traduko “Oupnekhet” kaj diris: “Ĝi estis la konsolo de mia vivo, ĝi estos la konsolo de mia morto.”

Pri la rilato de Schopenhauer kun hindaj religioj (Hinduismo, Budhismo) ekzistas pluraj libroj kaj artikoloj.

Portugallingva artikolo, publikigita en Brazilo en 2012, estas titolita “La verko Oupnek’hat en la filozofio de Schopenhauer”. “Oupnek’hat” estas la titolo de la menciita latina traduko de la Upaniŝadoj; do la artikolo pritraktas aparte la influon de tiuj tekstoj sur la ideojn de la germana filozofo.

Antaŭ ol montri, ke Schopenhauer i.a. rilatas al kvin specifaj Upaniŝadoj, la du aŭtoroj de la artikolo citas jenajn frazojn de la filozofo:

Sur ĉiu paĝo [de la traduko] troviĝas profundaj, originalaj kaj sublimaj pensoj, kaj super la tuto fluas alta kaj sankta seriozeco [...]. Oupnek’hat estas la plej profitodona kaj kortuŝa legado kiun oni povas fari en ĉi tiu mondo (krom la originala teksto): ĝi estis la konsolo de mia vivo kaj ĝi estos la konsolo de mia morto. Koncerne al certaj timoj esprimitaj kontraŭ la aŭtentikeco de Oupnek’hat, mi rilatas al la noto sur p. 271 [...] de mia Etiko.

[...] Mi estas firme konvinkita, ke ĝis nun nur en Oupnek'hat oni povas akiri veran scion pri la Upaniŝadoj.

Post tiu libro Schopenhauer legis plurajn aliajn hindajn tekstojn (hinduismajn kaj budhismajn), tiel ke la aŭtoroj de la menciita artikolo asertas:

En la kolekto de la 50 tekstoj de Oupnek'hat troviĝas multaj el la orientaj konceptoj kiujn Schopenhauer prezentas en sia verko: "velo de *Maya*"; "*mahavakya*" (la granda parolado), "*Tat tvam asi*" (Vi estas ĉi tio!); la hinda "*Trimurti*" (Brahmao, Viŝnuo kaj Ŝivao, la tri dioj de kreado, konservado kaj detruado); Atmo (animo, esenco); la konceptoj de Karmo (kaŭzo kaj efiko) kaj Darmo (devo); kaj Brahmo (universala esenco). Tiaj scioj (konceptoj) aperas en la diversaj verkoj konsultitaj de li, precipe en la Upaniŝadoj (Oupnek'hat) kaj en la Bagavadgito.

P.S.: En artikolo de la E-Vikipedio pri la ĉefverko de Schopenhauer ("La Mondo kiel Volo kaj Ideo") legeblas: "*Kiel volo Schopenhauer komprenas, inspire de la orienta filozofio, kosman principon de la ekzisto, kiu estas respondeca por la individua ekzisto en la mondo [...].*"